ESPERANTO

MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 12

DECEMBRO 2021 Kol. 439/37

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Enhavo: Advento, festo de Brno, Benketo, Mediteranea semajno, Demosteno, El la redakcio

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Advento.

Denove venis la komenco de liturgia jaro, la periodo de kvar semajnoj antaŭ la kristnaskaj festotagoj. Temas pri la spirita preparo pro Kristnasko, tempo de meditado kaj homameco. Iam tio estis fastotempo, tiam estis komplete malpermesitaj amuzaferoj, danco, eĉ kantado.

Adventa krono aperis jam dum la unua duono de la 19-a jarcento. La unua ĝisrestinta informo devenas el la jaro 1838 el la urbo Munkeno. Oni ekbruligas sur la krono laŭvice kvar, iam eĉ kvin kandelojn.

La unua adventa dimanĉo estas fera. En la kalendaro tio estas ĉiam inter la 27-a de novembro kaj la 3-a de decembro. Do temas pri la movebla dato, por ke la kvara adventa dimanĉo venu al la dimanĉo antaŭ la 24-a tago de decembro. Oni ekbruligas la unuan violkoloran kandelon, la tiel nomatan

kandelon de la Espero (de Patriarkoj). Tiu ĉi kandelo estas dediĉita kiel memorindaĵo al la profetoj, kiuj proklamis la naskiĝon de Jesuo-Kristo.
La dua adventa dimanĉo estas bronza. Homoj ekbruligas la duan violkoloran kandelon, tiel nomatan kandelon de la Paco (de Antaŭvidistoj). Tiu ĉi kandelo signifas amon kaj prezentas la kristnaskan kripon de Jesuo.
La tria adventa dimanĉo estas arĝenta. Ni ekbruligas rozkoloran kandelon tiel nomatan kandelon de Amikeco (de la Johan-Baptisto). Tiu ĉi kandelo esprimas ĝojon, ke la fastotempo baldaŭ finiĝos.
La kvara adventa dimanĉo estas ora**.** La popolo ekbruligas la lastan violkoloran kandelon, la tiel nomatan kandelon de la Amo (de Maria, la patrino de Jesuo)*,* kiu simbolas pacon kaj trankvilon, La kvara adventa dimanĉo povas esti samtempe la antaŭkristnaska tago.
La kvina, blanka kandelo situas meze de la krono. Temas pri la simbolo de la Virgulino Maria, de Kristnasko, aŭ Jesu-Kristo mem. Ĝi estas nomata Krista kandelo**.**

Tradukis Pavel Nechvíle

Festo de la 120 - jara datreveno de E-klubo Brno

Komence de aŭtuno, ĉeĥaj esperantistoj post la pandemia paŭzo kaj ferioj, feliĉe, denove reviviĝis.
Oni komencis renkontiĝadi en siaj E-kluboj, kafejoj, restoracioj, hejmoj kaj oni ankaŭ organizis oficialajn aranĝojn.
Septembre okazis malfermo de nova ekspozicio pri universalaj kongresoj en la Muzeo de Esperanto en Svitavy – la informon pri ĝi vi povis legi en la oktobra Informilo.

Post 14 tagoj festis la E-klubo en Brno la 120-jariĝon kaj komence de oktobro pasis sukcesa konferenco de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en la malgranda moravia urbo Bartošovice, en ĝia ĉarma kastelo – la informon vi povis legi en la novembra Informilo.

La kunveno de ĉirkaŭ 30 personoj okazis en la klubejo de bela, granda konstruaĵo NOSRETI, proksime de la ĉefstacidomo de Brno.

La organizantoj zorgeme pripensis ne nur buntan kaj interesan programon, sed ankaŭ sprite organizis la tagmanĝon: por ne foriri al iu restoracio kaj ne perdi valoran tempon, oni lasis alporti al ĉiu ĉeestanto grandan picon. (Mi havis tagmanĝon, vespermanĝon hejme kaj peceton por matenmanĝo. Kvankam mi ne preferas tiun ĉi manĝaĵon, mi diras – bongusta pico, bona ideo).

Sed reen al la solena kunveno:

Antaŭtagmeze okazis la bapto-lanĉo de la libro Kosmofabeloj, kies aŭtorino estas la ĉeĥa verkistino Gabriela Kopcová. – La

ĉeĥan tekston eminente tradukis en Esperanton Mirek Malovec kaj eldonis la eldonejo KAVA-PECH.
La simpatia aŭtorino, kiu ĉeestis, legis po alineoj la ĉeĥan tekston de la fabelo Planedo Vivulo, kaj L. Chaloupková tralegis la samon en Esperanta traduko. La originala teksto enhavas tiom da kaptivaj vortoj, ke ni ĉiuj admiris la vere majstran tradukon de Mirek. La libro Kosmofabeloj estas aĉetebla ĉe la eldonejo KAVA-PECH.
Post la jam menciita tagmanĝo okazis la dua parto de la programo.
Pri konciza historio de E-klubo Brno parolis Mirek Malovec, akompanante sin per lumbildoj. La E-klubo en Brno estis fondita en la jaro 1901, kiel la unua E-klubo sur nia teritorio, (apartenanta tiam al la Aŭstra-Hungara Regno). Nur la venontan jaron, 1902, estis fondita la E-klubo en Prago. La prelego estis tre interesa kaj ĉi-tempe ĝi estas elŝutebla en Jutubo.
La programo estis riĉigita per virtuala gitarludo kaj kantado de Esperantaj kantoj de Pavla Dvořáková. Ŝi ankaŭ deklamis la ĉarman poemon de la ĉeĥa poeto V. Nezval „Sur bord´ de Svratka river´. De nun mi jam konas la novan E-vorton, la nomon de la eta blua floreto – veroniko. Ĉu vi konas veronikon?
Poste doktoro Oldřich Arnošt Fischer prelegis pri flaŭro, flora faŭno de Brno, ankaŭ kun lumbildoj, ankaŭ tre interese. Ankaŭ tiun ĉi prelegon vi povas trovi ĉe Jutubo.
Dum la tuta tagprogramo oni povis aĉeti, aŭ nur trarigardi, Esperantan literaturon en la libroservo. La samideano Fischer eldonigis (je sia propra moninvesto) bildkartojn koncerne la jubilean okazaĵon.

Post la fino de la programo kelkaj partoprenantoj, sub la gvido de sinjoro Fischer, iris promene tra la historia parto de Brno.

Krom malnovaj domoj ni vidis la „drakon“ sur la malnova urbodomo kaj ankaŭ lignan radon, kiun antaŭ preskaŭ kvar jarcentoj konstruis kaj piede alrulis lerta junulo dum unu tago, 54 km, de la urbo Lednice al Brno.
Ni adiaŭis plene kontentaj, travivinte belan kaj interesan tagon meze de geamikoj. La festotago de la E-klubo estis vere sukcesa! Koran dankon al la sindonaj organizantoj!

L Chal.

Benketo por viktimoj de Kovim-19

Post iom da tempo, pli longa ol kutime pro Kovim-19, mi vizitis denove la urbon Pardubice. Proksime de la Urba teatro, sur la Placo de la Respubliko, mi ekvidis nekutiman rememorigon al la viktimoj de la pandemio, kiun iniciatis geamikoj kaj gekolegoj de la ŝatata savisto Jan Novotný, kiu dum 30 jaroj helpis savi vivojn, kaj kiu mortis pro Kovim.
La organizantoj de tiu aranĝo inspiriĝis per benketoj dediĉitaj al diversaj homoj, kiuj troviĝas en diversaj parkoj. Pro tio ankaŭ en Pardubice sur la loko, kiun vizitadas multaj homoj, estis instalita benketo, kiu portas la nomon de Jan Novotný, sed ankaŭ portas la nomojn de aliaj viktimoj de tiu insidema malsano. Sur ĉiu ŝildeto estas skribitaj krom la nomo ankaŭ la datoj de naskiĝo kaj de forpaso.

Inter aliaj estas ankaŭ ŝildeto pri nia kara amikino, samideanino

Lenka Angelová, kiu tre mankas al ni ĉiuj, kiuj konis ŝin. Kune kun ŝi ni travivis multajn belajn kaj agrablajn tempojn en la asocio AEH, al kiu ŝi sindoneme dediĉis kaj transprenis de sia patrino Jarmila Rýznarová kaj same sindonplene ŝi estris. Almenaŭ tiamaniere estas honorigita ŝia memoro menciante ŝian nomon sur tiu ĉi objekto.
Estas tio nia devo protekti memoron pri ŝi kaj esprimi nian dankemon pro ŝia laboro en nia asocio kaj por propagando de la ideoj de Esperanto.

Zdeněk Myslivec

Mediteranea Esperanto-semajno 2022

Restadejo Val d'Esquière – Les Issambres – Francio (Lazura Marbordo)

de la 26-a de februaro ĝis la 8-a de marto 2022

Ĉu ankoraŭ frostas en via regiono? Tuj venu al la Mediteranea Maro, kie floras mimozoj kaj migdalarboj! Vin atendas amika familia etoso, belegaj pejzaĝoj, bona ripozo kaj lazura maro...

Informoj kaj aliĝoj:

Monique Prezioso, 92 allée des Harkis, FR 83700 Saint-Raphaël, Francio
prezmoni@hotmail.com - tel. 0033 (0)4 94 83 06 88

Christine Graissaguel, Les Iles d'Or-A, 59 rue du Progrès, FR 83600 Fréjus
kris_grai@hotmail.fr - tel. 0033(0)4 94 95 66 18

Demosteno

Demosteno estis la plej granda greka oratoro. Li perdis la patron, kiam li estis apenaŭ sepjara. Foje li aŭdis oratoron kaj estis ravita per la bela parolado. Li tuj decidis ankaŭ mem fariĝi iam oratoro. De tiu tago li ne partoprenis plu en ludoj, sed dediĉis la tutan tempon al legado, skribado kaj parolado. Kiam li jam estis plenaĝa, li foje preparis belan paroladon kaj diris ĝin antaŭ popola kunveno. Sed oni prifajfis lin kaj ŝajnis, ke lia tuta penado estis vana. Malĝoja li revenis hejmen. Amiko kuraĝigis lin al dua provo. Li laboris ankoraŭ pli diligente kaj pli flue diris la paroladon. Sed, ho ve, oni ree priridis lin. Kaŝinte la vizaĝon en la mantelon, li iris malespere hejmen. Alia amiko vizitis lin kaj montris al li la mankojn kaj erarojn de lia parolmaniero. Demosteno havis kiel oratoro tri ĉefajn mankojn: unue li parolis tro mallaŭte, ĉar li havis malfortan bruston: due li parolis malklare kaj kelkajn konsonantojn li tute ne povis elparoli, ekzemple R: fine li havis malbonan kutimon, ke li levis la ŝultrojn post ĉiu dirita frazo. Sed kiel forigi tion? Demosteno ne perdis la esperon. Kion oni volas, tion oni povas.

Por fortigi la bruston Demosteno suriris ĉiutage la plej krutan monton aŭ iris al la bordo de la maro, kiam la ondoj bruegis, kaj penis per sia voĉo superi ilian muĝon. Por bone elparoli R kaj kelkajn aliajn sonojn, li metis malgrandajn ŝtonojn sub la langon kaj tiel parolis. Por forigi la kutimon levi la ŝultrojn, li pendigis super la ŝultro glavon, kiu vundis ĝin ĉiufoje, kiam ĝi leviĝis. Fine li tondis la harojn mallonge: li ne povis eliri kaj la tutan tempon devis dediĉi sin al siaj studoj. Per tiaj senĉesaj ekzercoj kaj penoj li fine fariĝis la plej granda oratoro de la mondo.

D-ro Kabe

El la redakcio:

28. 10. 2021 mortis nia ano Karel Vala el Šumperk, 80-jara.

Honoron al lia memoro.

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj:Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **+420 721 537970**
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
IBAN: CZ3520100000002801322017SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.